



La 7-a Azia Kongreso de Esperanto okazos en Jerusalemo, inter 18-22 de Aprilo 2013, koincide kun la 14-a Israela Kongreso. Kvin-taga Esperanto-festeno kun riĉa soci-kultura programo kaj multaj ekskursoj en Jerusalemo kaj ĝia ĉirkaŭaĵo, kiu dum tiu sezono havas perfekte agrablan veteron.

**Temo** Ekologio de paco - paca kunvivado de homo, medio kaj naturo. Distra programo: Kajto kaj Jomo.

**Ekskursoj** Antaŭ kaj post la kongresaj tagoj estas planataj plurtagaj turismaj ekskursoj - entute du neforgeseblaj semajnoj de Esperanto-turismado tra Israelo kaj Jordanio. Ĝi estos pli granda versio de la jam tradicia turisma programo lige kun la Israelaj Kongresoj (vidu ekzemple en *Esperanto*, Julio 2012 p.160). profesie akompanota kaj ĉiĉeronota en Esperanto (detala programo dorsflanke; eblas mendi nur parton).

14-17.4 – **Antaŭkongreso:** Hajfa kaj Akko, Nazareto, Lago de Galileo, Tel-Avivo kaj antikva Jafo.

18-22.4 – **Israela Kongreso:** Jerusalemo kaj la ĉirkaŭaĵo

23-27.4 – **Postkongreso:** Morta Maro, Masada, Eilat kaj la Ruĝa Maro; eblos viziti Petra.

**Kongresejo** Ni loĝos en la moderna gastejo *Rabin*, en la nova okcidento de Jerusalemo. Ĝia retadreso:

<http://www.iyha.org.il/eng/Index.asp?CategoryID=73&ArticleID=57> . Ĝi estas plene ekipita por okazigi konferencojn, kun diversgrandaj salonoj, granda manĝejo kaj komfortaj ĉambroj. Tuj apude troviĝas ankaŭ pluraj grandaj hoteloj. Moderna tramo kaj buslinioj efike kaj rapide ligas ĝin al ĉiuj urbopartoj, aparte al la antikva Jerusalemo. Je kelkminuta promeno de la gastejo troviĝas la Israela Muzeo, la Kneset (parlamento), la bela Roz-Parko kaj la universitato de Jerusalemo.

## La Internacia Junulara Kongreso

La 69-a IJK okazos la **19-26.8.2013** proksime de la Lago de Galileo. Ĝia temo tuŝos interalie la manierojn kunvivi kun la Naturo en harmonio, kaj kritike rigardos la ekologiajn progresojn en diversaj landoj. La IJK estos unika ŝanco sperti vivadon ene de la kibuco - komunuma setlejo; simila turisma programo estas planata ankaŭ por ĝi, konatigante la ĉeestantojn kun la loka kulturo, aŭde, vide kaj guste.

Pliaj informoj kaj aliĝo: [www.esperanto.org.il](http://www.esperanto.org.il) כינוס אסיה וכינוס הנוער הבינ"ל - האגודה לאספרנטו בישראל

